



foto : "survoje al Manosque"

# ESPERANTO - PROVENCE

n° 97 - somero 2014

Ŝiru rozajn en somero, ĉar en vintro ili ne estas. (Proverbaro Esperanta – n° 525-6)

## trimestra gazeto de la Provenca Esperanto-Federacio

### federacia retejo

[www.esperanto-provence.org](http://www.esperanto-provence.org)

### nia federacio sur Facebook

[www.facebook.com/  
esperantoprovence](http://www.facebook.com/esperantoprovence)

### prezidanto

Pierre Oliva

2772 Montée du Vieux Camp

83330 Le Castellet

04 86 15 05 35

[nlpo@hotmail.com](mailto:nlpo@hotmail.com)

### baza kotizo por aliĝo

(kun gazeto) : 6 €

ĉeko je la ordono :

"Espéranto PACA"

pagota al via loka asocio

aŭ sendota al la

### kasisto

Michel Cerisay

15 Place des Vents provençaux

13140 Miramas

[mcerisay@gmail.com](mailto:mcerisay@gmail.com)

### redaktoro kaj enpaĝiganto

Pascal Vilain

61 Montée du Castelar

83460 Taradeau

06 42 19 68 51

[p.vilain83@orange.fr](mailto:p.vilain83@orange.fr)

-

### limdato por sendo de publikotaĵoj por la venonta n°

**25a de Aŭgusto 2014**

bonvolu sendi al la supra retadreso

antaŭdankojn pro viaj kontribuoj

## Vorto de la Prezidanto

La studperiodo, kiu komenciĝas en Septembro kaj finiĝas en Junio, estis ĉijare stampita de nekutima evento, almenaŭ por ni, francaj esperantistoj, ĉar tio ne okazis en aliaj landoj : la partopreno en la Eŭropaj balotoj de kandidatoj de la listo « Europe – Démocratie - Espéranto ». (Vidu prian artikolon en nia gazeto). Kelkaj el vi aktivis por konigi tiun liston kaj sekve nian lingvon. Dankon al vi ! Aliaj preferis resti je pli konata labortereno : la lernado. Ankaŭ vi estas gratulindaj.

Nun venis la somero, sezono plena je eblecoj plu studi en la diversaj staĝejoj (Grezijono, Kvinpetalo, *Plouézec*) kaj partopreni eksterlande en internaciaj aranĝoj. Eblas ankaŭ akcepti eksterlandanojn, kiuj tre volonte vizitos nian landon.

Al ĉiuj membroj de nia federacio, mi do deziras : kaj aktivan someron, kaj agrablan ripozadon !

*Pierre Oliva*

## Elections européennes Europe-Démocratie-Espéranto

Les 8 listes françaises de « Europe-Démocratie-Espéranto » ont recueilli un total de 33 609 voix, représentant un pourcentage de 0,18 %.

Sous le nom : « Langue commune équitable pour l'Europe », la liste E.D.E menée pour la circonscription Sud-Est par Monique Arnaud a quant à elle recueilli 5898 voix (79 en région Corse, 3304 en région Rhône-Alpes et 2515 en région PACA), avec un pourcentage identique au vote global des Français : 0,18 %, donnant à cette liste la 16ème position sur 23.

(A noter qu'un retard n'a malheureusement pas permis aux habitants de Corse du Sud de disposer à temps des bulletins de vote pour EDE).

Voici les résultats plus détaillés pour les départements faisant partie de notre fédération « Espéranto-Provence » :

04 - Alpes de Haute-Provence :	135 voix – 0,23 %
05 - Hautes-Alpes :	145 voix – 0,30 %
06 - Alpes-Maritimes :	477 voix – 0,15 %
13 - Bouches-du-Rhône :	859 voix – 0,16 %
83 - Var :	622 voix – 0,19 %
84 - Vaucluse :	277 voix – 0,16 %

**ALPES DU SUD** Deux Haut-Alpins d'origine et d'adoption mènent des listes dans la circonscription sud-est

# Les Européennes vues des Alpes du Sud

La Haut-Alpine Monique Arnaud veut que l'Europe parle l'espéranto

**M**onique Arnaud prévient tout de suite : « Je ne brigue pas une place de députée européenne... » Ça tombe bien : le mouvement Europe Démocratie Espéranto n'a aucune chance de faire son entrée au parlement de Strasbourg à l'issue du scrutin du 25 mai. Présent pour la deuxième fois en 2009, il avait obtenu 0,15 % des suffrages.

**S**top à l'hégémonie de l'anglais

La Haut-Alpine est au tête de liste pour la circonscription sud-est, qui rassemble les régions PACA et Rhône-Alpes. Mais à part une escapade dans la Drôme, une autre dans le Vau, elle va se cantonner aux Alpes-de-Haute-Provence et aux Hautes-Alpes. Et à vrai dire, la candidate de 73 ans va surtout privilégier Clap et le Champagnat, où elle vit, en allant à la rencontre des électeurs sur les marchés et à la sortie des écoles. La tête de liste « délégué » à ses collègues implantés dans les autres départements. Et puis quand on fait campagne sur ses propres

deniers, il faut ménager sa monture.

Alors pourquoi cette candidature ? « C'est une tribune pour dénoncer la discrimination linguistique et faire découvrir l'espéranto », résume Monique Arnaud. Pour l'Europe Démocratie Espéranto, il y a au Parlement européen « un problème linguistique ». Dans cette tour de Babel, il y a 28 Etats et 24 langues officielles. Trois langues « de travail » y sont utilisées : le français, l'allemand, l'anglais. « Dans la réalité, il faut beaucoup de temps pour obtenir la traduction des textes », observe Monique Arnaud. Plus, « la domination de l'anglais est très très forte » regrette encore celle qui a pourtant enseigné la langue de Shakespeare.

**L'espéranto, c'est la démocratie**

Il y a là une « discrimination » contre ceux qui ne maîtrisent pas à fond l'anglais. « La vraie démocratie, c'est quand les gens peuvent communiquer entre eux sur un pied d'égalité », souligne Monique Ar-

naud. Nous sommes pour la diversité des langues et des cultures. On aimerait que cette soumission à l'anglais cesse. »

La solution, c'est donc l'espéranto. Cette langue universelle créée à la fin du XIX<sup>e</sup> siècle n'offre que des avantages, selon la candidate. Elle est facile à apprendre « parce qu'il n'y a pas d'exceptions, parce qu'elle est logique, claire et phonétique – impossible de faire des fautes d'orthographe : on écrit comme on entend –, et parce qu'elle fait appel beaucoup plus à la logique qu'à la mémoire ». Ainsi, là où il faut 1200 heures à un lycéen français pour atteindre le niveau bac en anglais, il n'a besoin que de 150 heures pour l'espéranto.

Selon Monique Arnaud, qui est notamment responsable auprès de l'Unesco de la ligne internationale des émigrants d'espéranto dans le monde, l'anglais montre des signes de déclin, et ne pourra de toute façon pas dominer encore longtemps. Tandis que l'espéranto se développe, notamment via Internet.

La Haut-Alpine pense que

« dans une ou deux présélections, il est tout à fait possible que l'espéranto devienne la langue de communication de l'Europe ». Ce serait tout bénéfice : les eurodéputés pourraient « communiquer, légiférer et travailler à égalité ». Avec des gains de temps et donc d'argent non négligeables.

**À l'instar de Monique Arnaud, toutes les listes de liste d'Europe Démocratie Espéranto sont des femmes. Dans la promotion de l'espéranto et la défense des langues maternelles, ce mouvement militait pour la paix, l'égalité hommes-femmes et les Droits de l'Homme.**

**Monique ARNAUD**

Monique Arnaud nous a fait parvenir ce message le mercredi 28 mai :

Karaj,  
Tutkore mi dankegas ĉiujn, kiuj helpis por disvastigo de nia mirinda lingvo !  
Espereble mi baldaŭ brakumos plurajn el vi en *Chambéry* okaze de la nacia kongreso de *Espéranto-France*.  
Post kelkaj minutoj, mi foriros al *La Chartreuse*. Post politika baraktado, mi ĝuos montaran silenton ! Sed ne longe...  
Nepre vizitu kaj konatigu la tt-ejon bone faritan de *Bert Schumann* : [www.ede2014.fr](http://www.ede2014.fr)  
Kiom da homoj interesiĝos pri lernado de Esperanto ? Ni vidos.  
Tre amike,  
Monika

affiche de la circonscription "Sud-Est" de E.D.E. >>>

Elections européennes du 25 mai 2014 – Circonscription du Sud-Est

**E** Europe Démocratie Espéranto

Pour une **vraie démocratie** en Europe.  
Pour préserver la **diversité des langues et des cultures**.  
Pour le **respect de la Déclaration** universelle des droits de l'homme de 1948.  
Pour communiquer, légiférer et travailler à **égalité en Europe**.

**adoptons l'espéranto, langue commune équitale pour l'Europe !**



le 25 mai 2014, votez  
**pour la démocratie et l'espéranto !**  
[www.ede2014.fr](http://www.ede2014.fr)

## Baldaŭ en nia federacio...

### Forumo de Asocioj

En *La Ciotat*, sabaton la 6an de Septembro, fine de la Malnova Haveno. inf. *Renée Triolle* 04 42 71 42 74

En *Marseille*, dimanĉon la 7an de Septembro, *Parc Borely*. inf. *Thierry Spanjaard* 04 91 71 82 24 aŭ 06 09 18 28 51

En *Fréjus*, sabaton la 6an de Septembro, Sporta Centro *Guy-David*. inf. *Monique Prezioso* 04 94 83 06 88

eble en aliaj lokoj... informiĝu...

### Staĝo en Le Beausset

29an kaj 30an de Novembro (informoj kaj aliĝilo en la aŭtuna numero de via gazeto)

## Provencanoj en Esperantujo.

### Nacia Kongreso de *Espéranto-France* en *Chambéry* (29an de Majo - 1an de Junio)

Membroj de *Espéranto-Provence* veturis al Alpoj : *Monique Arnaud* (sekretario), familio *Prezioso*, *Bernard Greck* kaj *Renée Triolle*. Tre familieca kongreso, kunokazanta kun la federacio *Rhône-Alpes*, kiu enprogramigis lokajn simpatiantojn. Ni tiel povis aplaŭdi infanojn, kiuj emociigis ĉiujn, kantante "La Esperon" aŭ amuzis, ludante la lokan legendon pri la "Dento de la Kato". Granda loko estis donita al la konatigo kun la regiono : ne nur agrablaj ekskursoj (ĉu piedaj, ĉu aŭtobusaj), sed ankaŭ faka prelego pri la floro kaj faŭno de Savojo. Tre interesa estis la paraleligo de programeroj por aktivuloj, kiuj debatis pri la laboro de *Espéranto-France* aŭ organizo de la Universala Kongreso en Lillo venontjare ; kaj por komencantoj kun ludoj aŭ manlaboro (*origami*). *Mireille Grosjean* prelegis pri "Esperanto, lingvo de paco", la itala *Michele Gazzola* pri "Lingva justeco, lingva politiko en Eŭropo", kaj *Brian Moon*, vicprezidanto de la Akademio, pri "Vivo kaj utilo de Akademio de Esperanto".

Ĉu premieris en Francio profesia kantisto-dancisto-humoristo *Attila Schimmer*, hungardevena aŭstro ? Ĉiuokaze li kaptis la publikon antaŭ folkmuzika grupo *Kernoz*, kiu dancigis la plej energiplenajn kongresanojn.

Mirinde organizita estis tiu kongreso : la kongresejo (kvartala domo por ĉiuj) situis en fora loko, ekster la

centro, do manĝoj venis al ni, dum aktiva teamo senlace kaj rapide surtabligis, lavis, balais. Dankojn al ili kaj gratulojn al la organizintoj.



*gprovencanoj kaj EDE-aktivuloj*

Tre bone antaŭfarita estis la informado pri tiu kongreso : du kelkminutaj ĉe *FR3 Rhône-Alpes* ; pluraj duonpaĝaj artikoloj en la gazeto "*Le Dauphiné Libéré*". Dankojn al *Didier Loison* el *Espéranto-France* kaj *Philippe Pellicier* el Savojo.

*raportis Renée Triolle*

### Du Provencanoj por tutmonda laboro ĉe ILEI.

ILEI estas la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, kiu aperigas fakan gazeton : "Internacia Pedagogia Revuo" kaj ankaŭ revuon por infanoj kaj komencantoj : "Juna Amiko".



*Renée,  
Monique  
kaj  
Mireille.*

Ĝenerala tendenco estas esperantigi la landajn vortojn. Kiuj el vi neniam parolis pri "kolegio", "liceo" aŭ "bakalaŭro" ? Sed ĉu japano aŭ Brazilano komprenos ?

Venis la ideo unuecigi la terminaron pri instruado ; sekve *Monique Arnaud* (kun sperto pri angla kaj usona instrusistemoj) kaj *Renée Triolle* (pri rusa) kunvenis en *Les Brennets* (Svislando) kun la prezidanto de ILEI, *Mireille Grosjean*, por prilabori tiun terminaron de la 2a gis la 5a de Junio.


La revuoj estas aboneblaj ĉe *Monique Arnaud*. Same membrigo al ILEI, kun landa sekcio GEE, sin turnas al la homoj, kiuj favoras instruadon de Esperanto.

*ndlr :*

La terminaro prilaborita de niaj du samideaninoj estas ĉi-tie legebla :

[http://ilei.info/novajtoj/rezulto\\_de\\_laboro2014.pdf](http://ilei.info/novajtoj/rezulto_de_laboro2014.pdf)

Internacia  
Pedagogia Revuo  
kaj  
Juna Amiko,  
la IPR-revuo



## Vizito al CDELI

**Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Lingvo Internacia**  
**Centre de Documentation et d'Etudes sur la Langue Internationale**  
**en urba biblioteko de La Chaux de Fonds (Svislando)**



de maldekstre dekstren :

Renée Triolle, Stefano Keller, Claude kaj Andrée Gacond

En al urba biblioteko, CDELI okupas parton de la arkivejoj, sed disponas ankaŭ pri granda salono, kie senlace laboras la iniciinto, *Claude Gacond* kaj lia edzino. La ĉefa ideo estas, ke konserviĝu ĉiuj dokumentoj skribitaj en Esperanto (ĉefe gazetoj, sed ankaŭ informiloj, aliĝiloj ks.).

*Monique Arnaud* kaj *Renée Triolle* konstatis, ke forestas nia gazeto "*Espéranto-Provence*". Do, ne ĵetu viajn dokumentojn, kontrolu unue, ke ili jam eniris tiun Centron. *Stefano Keller* enkomputigas la tre precizajn slipojn kompilitajn de dekoj da jaroj.

Vizitu fizike tiun centron, sed ankaŭ rete : [www.cdeli.org](http://www.cdeli.org)

## Staĝo en Kvinpetalo

Mirindan staĝon ni spertis kun Katalin Kovats ! Ni multe laboris ĉar la enhavo estis kompleta, diversa kaj interesa. Ĉeestis dekkvar esperantistoj el Francio, Usono, Svislando, Germanio kaj Kubo. La etoso estis tre agraba kaj la staĝejo Kvinpetalo kontribuis al tio.

Ni malkovris multajn pedagogiajn metodojn, perkomputilajn lecionojn, filmojn, bildojn, tekstojn, librojn, sed la ĉefa helpo fontis el la talento de Katalin, kiu ĉiam havis trafajn klarigojn, taŭgajn ekzemplojn kaj metodojn por ke ni povu adaptiĝi al niaj lernantoj.

Belegan semajnon ni pasigis ! Ni lernis kaj rehejmeniris kunportante multe da konoj, kiujn ni povos niavice donaci al aliuloj.

raportis Nicole kaj Pierre



el la grupo, kiu staras : meze, Nicole kaj Pierre  
maldekstre, Katalin Kovats  
dekstre, Brian Moon

## El niaj federaciaj asocioj

-----



### 04 - E.K.E.M. - Esperanta Kulturo en Manosque

*Deux fois par an, la Mairie de Manosque accueille les nouveaux arrivants. Notre association EKEM a été invitée à participer à cette cérémonie.*

Aprilo 7-11 : budo por prezentado de Esperanto en la Nukleenergia Centralo "Cadarache". Tia respondeculino aperigis reklaman flugfoliojn por klarigi nian agadon. Ni spertis ĉiutage bonegan etoson.

Junio 14 : sabata staĝo de la 9a30 ĝis la 17a.

Junio 28 : en Sainte-Tulle, « Fête des Solidarités ».

Julio 3 : Sur invitation de la conseillère d'orientation du Lycée Esclangon, nous nous sommes rendus à la salle polyvalente pour la cérémonie de récompenses destinée aux élèves ayant participé aux actions du Club Solidarité. Nous avons été invités à présenter notre activité et nos actions. Bon accueil !

Julio 5 : partopreno en la tago « Manosque à l'Asso ».

*informis José Grammatico*



*en la urbdomo de Manosque*



*en Sainte-Tulle*



*Manosque à l'Asso*



### 05 - Espéranto - Gap

#### Distinction

A la préfecture de Gap, en présence du Préfet, le Président du Conseil Général des Hautes-Alpes, Jean-Yves Dusserre, m'a remis la Médaille de bronze de la Jeunesse et des Sports pour mon engagement en faveur de la langue espéranto !

Près de 150 personnes assistaient à cette cérémonie, au cours de laquelle lecture fut faite à haute voix de l'origine de la distinction.

*Monique Arnaud*



*à droite :*

*Jean-Yves Dusserre*

*à gauche :*

*Joël Giraud, député de  
ma circonscription*

#### 29 juin : Fête de la Paix



La pluie n'a pas découragé les militants, mais elle a fait peur aux visiteurs !

Les enfants sont toujours intéressés par les B.D. et l'un d'eux avait beaucoup de peine à croire que l'espéranto puisse être parlé dans les 5 continents !

Grâce aux élections européennes, les gens sont un peu plus informés et plus intéressés. Plusieurs disent ne pas avoir trouvé de bulletins.



## 13 - Esperanto - La Ciotat

### Tri ĉinoj en Provenco

Eĉ se la striko de la fervojistoj portis ilin al Provenco kun unutaga malfruo kaj malpermesis parton de la antaŭvidita programo, la tri ĉinoj, invititaj de *Espéranto-France*, havis intensivan programon en nia regiono. Ili tri venas el *Wuhan* sur la Blua riverego. Tiu urbo estas bela ekzemplo de la nuna Ĉinio : 10 milionoj da loĝantoj, franca fabriko *Citroën* kaj aliaj fabrikoj, kiuj venigas la kamparanojn al la urboj (jam 56% de la loĝantaro vivas urbe), detruo de la malnovaj kvartaloj por alkonstruo de modernaj ĉielskrapaj domegoj kaj komercaj centroj, grandega polucio malgraŭ la logoj kaj reorganizitaj parkoj.

Trigo estas ĵurnalisto kaj jam vizitis nin antaŭ sep jaroj. Aroma estis kontistino en bankrotinta fabriko kaj nun iĝis sendependa, ŝia edzo estas dekoraciisto, ili respegulas la nun kreskantan mezan socitavolon ; kvankam ŝi jam vizitis plurfoje la staĝon en *Plouézec*, ŝi konfesis, ke nur nun ŝi kuraĝas paroli ; Ruĝa laboras ĉe komunikada entrepreno, ne parolas Esperanton sed lernis minimuman necesan vortprovizon, kiun ŝi uzas ĝuste kun afabla rideto.

Lundon la 16an de Junio, Trigo prelegis en *La Ciotat* ĉe *Grand Portique* pri " Ĉinio, inter moderno kaj tradicio", sub lavango de demandoj de la ĉeestantoj : pri la loĝkondiĉoj kaj prezoj, salajroj, tradicia kaj moderna medicinoj, korupcio, ktp.



Mardon, post rapida vizito al la maro, ili veturis tra la vinberejoj al *Le Beausset* por vizito al la turismoficejo, kiu eldonis informilon en Esperanto. Tie ili ricevis belan bukedon da lavendo, kiun ili trovas " purpura". Amika manĝo ĉe *Pierre* kaj *Nicole* konigis ilin al la novaj lernantoj, kiuj unuafoje kontaktis eksterlandanojn ! Sekvis vojaĝo al Marsejlo, kie ili intervenis ĉe *CIRA*. Tie la demandoj rilatis ĉefe al la lingvo, la skribmaniero en la unua klaso, la entreprenoj.

Merkredon, frua envagoniĝo por certi pri alveno ĝustatempe en Liono !

*raportis Renée Triolle*



#### Kelkaj rimarkoj pri ili :

*Renée* (gastigantino) : mi bedaŭras, ke mi konstante devis rapidigi ilin, sed ili fotas milfoje...

*Laurent* (nova lernanto, masonisto en *Le Beausset*) : Genie ! mi komprenas !

*Monique* (flegistino en *Le Beausset*) : Feliĉe ili uzas Esperanto-nomojn !

*Christiane* (en *Marseille*) : Mi preparis multajn demandojn, Trigo respondas simple.

*Pierre* : Ili neniam manĝis artiŝokojn sed ili provas ĉion.

*Nicole* : Prioritato al la novuloj, ke ili ĝuu sian novan konon de Esperanto.

*Danièle* : Ni parolas kaj forgesas, ke ni parolas al ĉinoj.



*ankaŭ Usonano estis akceptita de la klubo en La Ciotat*



### Maja pikniko

Kio do povis instigi 21 geamikojn kuniĝi marbore en *Le Dramont (Saint-Raphaël)*, la dimanĉon 4an de Majo ?

Tutcerte la allogo de tia ĉarma loko, mediteraneborde kaj vidalvide al la Ora Insulo !

Ankaŭ la preskaŭ suna vetero, kiu ebligis al ĉiu elekti laŭplaĉe ĉu ombroplenan ĉu sunbrunigan lokon.

Eble eĉ la plezuro gustumi ĉies kunportitajn manĝaĵojn plej ofte frandajn.



### Junia kunmanĝado

Tiom plaĉas al la membroj de la Klubo *Fréjus – Saint-Raphaël* renkontiĝi en amika etoso, ke post la surstranda pikniko en Majo, ili denove troviĝis la 29an de Junio, ĉifoje en *Les Issambres*, por kune festi la finon de la lernojararo.

Sed ĉar paŭzo en la lecionritmo ne signifas tujan malfervoriĝon en la praktikado de la lingvo, kelkaj bonvolemluloj : *Carmen, Christine, Mari-Roza* kaj *Jean-François*, kunigis grupetojn por plia uzado – ĉu baza, ĉu konversacia, ĉu luda..., de tiu lingvo, kiun ni iam decidis lerni kaj kiu ideale estu la sola komunikilo inter esperantistoj, eĉ se samlingvaj.

Mi ne bone scias, kio okazis en la grupoj, en kiuj mi ne laboris, sed mi nun scias, danke al la " Superzam' "de *Jean-François* :

- ke la Esperanta traduko de « *Douvres* » estas ne Dovro, kiun mi erare uzis ĝis nun, sed Dovero !

- ke la ĉefurbo de Nederlando estas ne Hago, kie tamen sidas la registaro, sed Amsterdamo !

- ke la plej alta Eŭropa monto estas ne nia Blanka Monto, kiel kredas pro mi multaj Dunkirkanoj, ekslernantoj miaj, sed la Kaŭkaza Monto Elbruso !

Kaj mi senhezite faras miaj la vortojn de *Philippe Combet* : « Ĝis venonta ludsiesio, kiel eble plej baldaŭa ! »

Sed... ĉu tia kunveno ne havu ĉefe kaj esence kiel celon la donitan eblon praktiki nian ŝatatan lingvon ?

Ha ! Jes ja ! Sed estus mensogo aserti, ke la konversacioj okazis nur Esperante !

Ni eĉ miris, ke *Carmen*, aŭdacinte ĵeti sin en la maron, rapide elakviĝis pro ĉeesto de meduzoj... sed tamen restis kun ni malgraŭ certa nombro da krokodil...emuloj (klarigo sur la sekva paĝo) !

Nu, tia lingva sinteno havas senkulpigan kialon : la ĉeeston kun ni de veraj komencantoj, kiuj kapablus nek kompreni nek partopreni en la konversacioj ; ankaŭ tiun de amikoj aŭ kunuloj, ne konante nian lingvon sed eminte kuniĝi kun ni.

Sed post la piknika tagmanĝo, tri grupoj formiĝis. Dum *Carmen* paroligis komencantojn, *Christine* ludigis praktikantojn per sia « *Tic Tac Boum* » kaj *Jean-François* klerigis kvaropon danke al sia kviza ludo « *Superzam'* ». Finfine, do, ĉiu kapablis « trovi ringon por sia fingro », kaj tiu tago ludis sian rolon : kunigi kaj paroligi samideanojn !




unu el la laboremaj grupoj, tiu de *Carmen*

pri ambaŭ eventoj raportis *Pascal Vilain*



Bonvenon al nova membro de nia federacio : **Bianca Muresan**, rumandevena Nicanino !

La 16an de Junio, en la Nica Universitato, Bianca sukcese prezentis sian tezon : "*L'émergence de l'idée moderne d'art dans les Réflexions critiques sur la poésie et la peinture (1719) de l'abbé Dubos (1670-1742)*" kaj sekve iĝis doktoro pri filozofio de arto. Gratulojn !



## Pri « krokodiloj » kaj « krokodili »

En la tridekaj jaroj, unu el la kafejoj [de la « *passage Choiseul* », en la dua distrikto de Parizo] estis la ĉiumonata rendevuejo de la Pariza Esperanto-Grupo. Kial ĝuste tiu kafejo ? Pro tio, ke la kelnero, iu *Ferrari*, estis esperantisto. [...] Li ne estis tre sperta esperantisto, tiel ke *Raymond Schwartz* diris iam pri li, kun sia kutima humuro : « Kelkfoje *Ferrari*... povas erari. »

Sed *Ferrari* estis tre fervora esperantisto, eĉ iom fanatika. Kiam iu el la kunvenantaro, pro pigreco, parolis ne plu Esperante, sed france, la brava kelnero grumblis : « kia sovaĝulo ! kia krokodilo ! » Ĉar li konsideris, ke paroli nacilingve en esperantista rondo estas ago de sovaĝulo. Kaj en lia buŝo, la vorto « krokodilo » signifis sovaĝan beston, sovaĝulon.

La uzado de tiu vorto amuzis la grupanojn, kiuj rapide ŝanĝis ĝin al verbo : li krokodilas, ni krokodilas, ktp. Tiel la Ea leksiko pliriĉiĝis je unu verbo : "krokodili – paroli nacilingve en medio E-ista aŭ (vastasence) internacia". (PIV).

(laŭ artikolo de *André Cherpillod*  
en Heroldo de Esperanto)



## 83 - Espéranto - Le Beausset

### Tri ĉinoj en nia urbeto

La 17an de Junio, ni akceptis en *Le Beausset* tri gesamideanojn el Ĉinio. Ni vizitis la turismejon por pravigi la fakton, ke eldonado de oficialaj dokumentoj en Esperanto estis bona investado por la urbeto. Ni promenis tra la vilaĝo kaj niaj amikoj multege fotis, kiel faras ĉiuj vojaĝantoj el Azio. La vizito finiĝis hejme per pikniko kiun ni antaŭvide preparis. Tiokaze, ĉiu el niaj gelernantoj partoprenis kaj povis interŝanĝi kun ni. Ĉeestis ankaŭ *Renée Triolle* kaj *Françoise Noireau*.

Resume : la tago estis agrabla kaj fruktodona.

raportis *Nicole* kaj *Pierre*



## 84 - Centre Culturel Espéranto d'Avignon

Ĉiumonate, la « *Espace Social et Culturel Croix des Oiseaux* », en Avinjono, organizas eventon : « *Les petits plats du monde* », kiu konsistas en preparado kaj gustumado de franda mangaĵo proponita de iu membro.

Anoj de nia Esperanto-asocio tiel havis la plezuron konatiĝi kun Brazila recepto : « *Vatapá* kun salikokoj », kiun ili gustumis en gaja etoso. Tiun specialaĵon el sialanda kuirarto zorge preparis brazilanino.



La *Vatapá*, plat brésilien typique, est une savoureuse purée de mie de pain où se mêlent épices, crevettes et lait de coco. La *Vatapá* a été amenée au Brésil par les esclaves africains qui arrivèrent au XVIe siècle lors de la découverte du Brésil par les Portugais. N'ayant pas exactement les mêmes ingrédients qu'en Afrique, ils ont dû innover avec les ingrédients disponibles au Brésil.

C'est une recette simple et originale pour amener un peu de soleil dans sa cuisine !

Nia jara pikniko okazis la dimanĉon 22an de Junio en *Vallabrègues*, la sola vilaĝo de la departemento *Gard*, kiu situas ĉe la maldekstra bordo de la riverego Rodano.

En la programo :

- vizito de la muzeo
- malkovro de la vilaĝo kaj ties arkitektura heredaĵaro : preĝejo, presbitero kaj ĉefe sesangula turo, kies pinto superas la tutan regionon.
- gustumado de la fama vilaĝa porkaĵo, premiita en 2014 : la « seka kolbaso de *Vallabrègues* ».
- pikniko ĉe lageto norde de la vilaĝo

el la bulteno « *Avignon-Espéranto* »



*Kia veteraĉo !  
Permesu al mi eniri  
kaj sidiĝi  
malantaŭe.  
Mi sentos min pli  
komforte por  
protokoli kontraŭ vi.*



## Paĝo de la komencantoj

teksto en facila Esperanto  
(fonto perdita - mi pardonpetas al la verkinto)

Kara amikino,  
Jen mia unua letero al vi. Mi deziras interŝanĝi leterojn kaj amikiĝi kun vi. Mi estas esperantisto de nur du monatoj sed mi progresas rapide, ĉar mi studas la lingvon ĉiutage. Mi deziras multe vojaĝi tra la mondo (se mi estus riĉa, tio estus facila). Mi kredas, ke Esperanto estas utila por trovi geamikojn en multaj landoj. Se vi pensas, ke ni povas interŝanĝi poŝtmarkojn, skribu al mi kaj mi certe respondos.  
Dankon kaj ĝis baldaŭ !  
Via amiko, Petro.

*Kaj nun, legu la subajn demandojn kaj provu respondi :*

- 01 - Kiu skribas leteron ?
- 02 - Ĉu li ofte skribas leterojn ?
- 03 - Al kiu li skribas ?
- 04 - Kial li volas skribi ?
- 05 - Kiu li estas ?
- 06 - Ĉu delonge li parolas Esperanton ?
- 07 - Kiel li progresas ? Kial ?
- 08 - Kion li deziras fari ?
- 09 - Ĉu li estas riĉa ? Kiel vi tion scias ?
- 10 - Li kredas, ke Esperanto estas utila. Por kio ?
- 11 - Kion li, krom leteroj, emos interŝanĝi ?
- 12 - Kion li promesas fari ?
- 13 - Per kiuj vortoj li adiaŭas ?

### La libera loko



En stadiono, dum la monda piedpilko-konkurso en Brazilo, sidas jam multe da futbalemluloj.  
Nenie liberas sidloko ; amaso da homo eĉ staras.  
Hodiaŭ ludos du famaj teamoj. Estas multe da bruo kaj multe da serĉantoj por la neokupitaj loketoj.  
Subite, juna, belstatura viro rimarkas antaŭ si simpatian virinon, mezaĝan, kaj apud ŝi dezirindan liberan sidlokon.  
« Bonan tagon, estimata sinjorino. Ĉu hazarde la loko apud vi estas neokupata ?  
- Ne, ĝi apartenas al mia edzo. Antaŭ kvin monatoj ni aĉetis la biletojn. Sed antaŭ tri tagoj li mortis kaj ne povas akompani min, bedaŭrinde.  
- Sed kial vi ne vendis la bileton al iu el liaj amikoj ?  
- Ne eblis, ili ĉiuj ĉeestas lian entombigon hodiaŭ ! »

### Plurelekta demandaro

elprenita el verkoj de Robert Llorens  
eldonitaj de *Espéranto-Info*



solvoj de la demandoj en EP 96 – printempo

#### 1 - gramatika

a : 3 ; b : 2 ; c : 1

#### 2 - vorto-trezora

ĉ 1 : forlaso ; ĉ 2 : rezigno ; ĉ 3 : malplenumo  
d 1 : faligi ; d 2 : buĉi ; d 3 : senkuraĝigi

#### plia demandaro

#### 1 - gramatika

a) Mi lernas la internaci..... lingvon Esperanto.  
1 – a ; 2 – an ; 3 – e

b) Kiam iomete pluvas, pluv.....  
1 – as ; 2 – egas ; 3 – etas

c) Ne estas facil..... esti akurata.  
1 – a ; 2 – o ; 3 – e

#### 2 – vorto-trezora

ĉ) elektu « nepra », « plena » aŭ « pura » por traduki la francan « absolu »

1 – inéluctable : .....

2 – total : .....

3 – alcool : .....

d) elektu « agordo », konsento » aŭ « kontrakto » por traduki la francan « accord »

1 – consentement : .....

2 – traité : .....

3 – musical : .....

*(solvoj en la venonta gazeto)*





### retropegule...

*La vie est parfois étrange. Alors que je connais Michèle T. et Gérard A. depuis quelques années, depuis que nos chemins se croisent au fil d'expositions artistiques en Dracénie ou ailleurs, jamais l'occasion ne s'était présentée de parler avec eux de l'espéranto. Le hasard a voulu que finalement ce mot en leur présence... et j'ai vu s'illuminer le visage de Gérard. Lucien Amat, son papa, était espérantiste. Sans doute certains lecteurs d'Espéranto-Provence l'ont-ils connu... J'ai proposé à Gérard de me parler de son père... il l'a fait en forme d'hommage, avec le joli texte qui suit...*

Pascal V.

### QUINZE ANS APRES...

**HOMMAGE A LUCIEN AMAT (1922- 1999),**  
président de l'association Tulona Espero,  
jusqu'au 1er mars 1999, Hyères (83)


Il nous est impossible, Guy, François et Gérard, fils de Lucien et Jacqueline AMAT, de penser à notre père sans l'évoquer dans un grand sourire permanent, amalgame de naïveté candide et de malice maîtrisée. Sans doute une réaction positive inconsciente due aux aléas de son existence particulière, marquée autant par l'absence parentale que par la rigueur imposée des orphelinats, voire des conséquences d'une guerre subie... L'enfance reste un apprentissage marquant, toujours décisif dans l'orientation d'une destinée.

Des handicaps lourds qui l'ont, en finalité, sublimé pour faire de son chemin de vie un acte engagé, dans l'objectif d'une politique plus humanitaire et cette espérance, jamais aboutie, d'un monde meilleur. Rêveur utopique ou voyant extra-lucide ? Sans doute un peu des deux...

Né à Toulon (Var), il a connu les Chantiers de Jeunesse et évitité, de justesse, la déportation. Il en a profité pour aller au Conservatoire de Musique afin de peaufiner un outil d'ébène : la clarinette, tout en courtisant une jeune femme qui apprenait le piano : notre future maman.

Il essaya plusieurs métiers (groom d'hôtel, chef de rayon à Toulona...) pour, finalement, faire carrière à l'Arsenal de Toulon en qualité de charpentier tôlier. En parallèle du travail qu'il exerçait avec beaucoup de sérieux, l'action associative et le partage d'un savoir le motivaient. Particulièrement, l'espéranto et la musique, deux universalités qui allaient donner un véritable sens à son existence.

Combien de souvenirs, quand nous étions enfants, de visites d'étrangers à la maison, dans le dialogue d'une langue commune créée par la volonté d'un certain docteur Zamenhof dont j'aurai l'occasion inopinée de me recueillir sur sa statue, quelques années plus tard, en Autriche ! Le hasard n'existe pas. Comme dirait Cabrel, ce n'est qu'un rendez-vous...



Combien de situations comiques vécues, combien de purs bonheurs nous a-t-il laissés ! Jusqu'à trouver dure la viande qu'il mangeait lors d'une sortie en famille alors qu'il mâchait le fond de l'assiette en carton, coupé au couteau... voire de tamponner de plein fouet une porte vitrée, à l'entrée d'un restaurant... ou d'oublier l'écouvillon dans le pavillon de la clarinette lors d'un concert... et de jouer naïvement avec sa surdité sélective pour ne pas entendre notre mère qui le sollicitait...

Jusqu'à ce fameux jour (1er mars 1999) ; un appel téléphonique : Papa est mort subitement, aujourd'hui, en début d'après-midi. Il était allé, comme chaque semaine, donner des cours d'espéranto à Hyères. Décédé dans le local de cours, assis sur une chaise, victime d'un transport au cerveau foudroyant !

Décidément, jusqu'à la fin, il nous aura étonnés ! Aujourd'hui, j'ai le sentiment qu'il pourrait bien encore nous surprendre et je souris déjà à l'idée de le voir se manifester, clarinette à la main, en nous lisant *Le Petit Prince*, ultime acquisition en espéranto, qu'il n'aura pas eu le temps de feuilleter...

Une vie exemplaire, riche d'activités multiples liées à un désir de communication dont l'espéranto, langue internationale, propose, par le franchissement de toutes les frontières du monde, une libre parole et un échange constructif vers la paix.

Gérard AMAT

## El la mesaĝkesto de la legantaro



Neatendite kaj nekutime, multaj kuraĝigaj mesaĝoj estis senditaj al mi. Mi decidis aperigi ilin, opiniante ke de nun povus estiĝi rubriko kun viaj rimarkoj, kritikoj, demandoj, petoj... Ek do al via skribilo aŭ klavaro... *(la redaktoro)*

### **Renée Triolle**

Dankojn por la bulteno, kiun mi legis kun koloroj sur la reto.

Tamen mi ne konsentas kun via konkludo, ke LLZ uzis "li" por "homo". Laŭ mi, eĉ por homo, se la sekso ne estas difinita, oni uzu "ĝi".

Ekz. : serĉata sekretari(in)o. Ĝi kapablu ... ĝi estu ...  
*respondo de la red.*

Ĉar mi kopiis sen ŝanĝoj humuraĵon, kiun mi ne skribis mem, (kun "li" por homo), mi emis aldoni la rimarkon pri la Zamenhofa uzo de "li", anstataŭ la gramatike taŭga "ĝi".

Fakte, la konkludo ne estas mia ; mi estus devinta aldoni la jenan referencon : "Lingvaj respondoj de LLZ - Respondo 23, La Revuo, 1907. Aŭgusto", aŭ eĉ aldoni al la rimarko la tutan respondon 23an.

### **Céline Bernard**

Le bulletin est superbe. Par contre, je constate que personne ne t'a fourni la présentation pour le WE Mont Ventoux. Si tu peux l'envoyer à ta liste, ce serait bien.

*respondo de la red.*

Dankon pro la afabla rimarko pri la bulteno, Céline ! Fakte, mi povas enpaĝigi nur la ricevatajn artikolojn kaj sciigojn. Mi do rediras al nia legantaro, ke ĝi ne forgesu sendi al mi, regule kaj akurate, ĉiujn informojn pri la asociaj agadoj aŭ pri siaj personaj travivaĵoj en Esperantio.

### **Bernadette Deschanel**

Le journal est parfait : très beau, très lisible, très intéressant ! Bravo !

*respondo de la red.*

Dankon Bernadette ! Tiuj rimarkoj de vi, kiu enpaĝigis tiom da gazetoj, estas ege kuraĝigaj !

### **Maggy Combet**

Gratulojn pro la alloga bulteno. La paĝo por komencantoj kaj la ŝercoj tre plaĉis al mi.

*respondo de la red.*

Dankon, Maggy ! Sed la paĝo por komencantoj ne plu estas por vi, ĉu ne ?



### **Liliane Alazraki**

Dankon pro via belega laboro, Pascal kaj Bernadette.

*respondo de la red.*

Dankon, Liliane ! Plaĉas al mi, ke vi skribis pri Bernadette, kiu faris bonegan laboron por multaj numeroj de nia bulteno.

### **Michel Dechy**

(prezidanto de la federacio « Espéranto Nord »)

Gratulojn pro la kvalitoj de la bulteno. Mi ja scias, ke Pascal bonege zorgas pri tia laboro ĉar li helpas ankaŭ nian regionan revuon, [la Nordan Gazeton], korektante la enhavon.

*respondo de la red.*

Dankon pro la gratuloj, Michel ! Redaktante nian provencan gazeton aŭ korektante la nordan, (kiu ankoraŭ estas la mia, ĉar mi plu membras en la Norda Federacio), la plezuro estas por mi la sama !

### **Thierry Spanjaard**

Dankon pro via granda laboro por publikigi nian regionan bultenon.

*respondo de la red.*

Dankon ankaŭ al vi, Thierry, kiu fojfoje nutras nian gazeton per viaj artikoloj kaj fotoj. Espereble ankaŭ multaj samideanoj el ĉiuj federaciaj asocioj tion faros.

### **Josée Boccadifuoco**

(prezidantino de la federacio « Espéranto Languedoc-Roussillon »)

Mi dankegas vin pro la sendo de via gazeto ; mi transsendos ĝin al niaj Montpelieranoj ; ĝi estas interesege ! Je mia nomo, salutu la geamikojn de via Federacio.

*respondo de la red.*

La anaro de « Espéranto-Provence » tutkore reciprokas salutojn al vi kaj al ĉiuj viaj samfederaciaj.

### **Françoise Noireau**

Dankon pro la alloga prezento de via gazeto.

*respondo de la red.*

La gazeto estas ankaŭ la via, Françoise, kaj ĉefe tiu de la tuta anaro de nia federacio... Dankon pro via afabla komento !



## A noter sur votre agenda

### En France

#### au château de Grésillon

1 - 9 août

Semaine Anationale Alternative

COURS: Naturopathie coréenne. Cours pour vous faire parler. Méthode directe Cseh.

CONFÉRENCES: Art de peinture. Culture coréenne et iranienne. Démocratie mondiale. Santé selon Göring

ACTIVITÉS: Traitement curatif coréen. Tai-chi-chuan.

Excursion. Théâtre et saynettes. Libroservo. Vélo.

Détails : <http://www.gresillon.org/s3fr>

9 - 17 août

Semaine Festive pour enfants, jeunes, familles

ACTIVITÉS: Fabrication de marionnettes, Chasse au trésor, Gymnastique, Travaux manuels, Chansos. Baignade

COURS: Méthode directe Cseh. Jouons pour parler passionnément. Libroservo

DISTRACTIONS le soir: Bal folk et concert de Kapriol'.

Voyage au Brésil. Films muets

Détails : <http://www.gresillon.org/s4fr>

Résumé du programme d'été au château de Grésillon.

<http://www.gresillon.org/ete>

[kastelo@gresillon.org](mailto:kastelo@gresillon.org)

[www.gresillon.org](http://www.gresillon.org)

Maison Culturelle de l'Espéranto

Château de Grésillon

49150 Baugé en Anjou

16 - 23 août

FESTO 2014, à Pont-de-Barret (26) apud Montélimar

inf. : [www.alesk.eu/festo2014/](http://www.alesk.eu/festo2014/)

15 -23 novembre

Eŭropa Rendevuo en Stella-Plage, Francio : la plej grava internacia semajnfino en Francio, norde de Parizo.

Denove ĉi jare bunta programo kun jOmO, Katalin kaj Martin KOVATS, Pascal kaj Mari-Roza VILAIN, Franjo

LEVEQUE kaj Michel DECHY. La partoprenantoj povas elekti inter tri diversnivelaj lingvokursoj : studi la vivon kaj verkaron de Georges Lagrange (Serĝo Elgo), sin prepari esti helpanto por la jubilea UK, eklerni kaj plulerni la lingvon kun Tinĉjo aŭ kanti en koruso. Koncerto, impona libroservo, ekspozicio de artaĵoj kaj vizito de la bela marurbo Le Touquet kompletigos la studojn.

info : Arlette kaj Edmond Plutniak

2, rue Ste Marguerite, Résidence Les Archers Apt 23  
62000 ARRAS (Francio).

[aplutniak@esperanto-nord.org](mailto:aplutniak@esperanto-nord.org)



**Ne forgesu !**

**LILLE2015**  
esperanto

**Kiel helpi por organizado de Universala Kongreso?**  
Comment aider à l'organisation du congrès mondial ?  
25an de julio 2015 - 1an de aŭgusto 2015

**Sponsoroj**

- ◆ Proponi sponsorojn kaj iliajn kontaktoformojn
- ◆ Prezenti Lille2015 kaj Esperanton al sponsoroj kaj konvinki ilin

**Akceptejoj**

- ◆ 60 volontuloj por akcepti la kongresantojn dum la unuaj tagoj kaj helpi kelkajn horojn en la kongreso
- ◆ Volontuloj por helpi en la kongreso pri multlingvaĵo

**Sponsors**

- ◆ Proposer des sponsors et leurs contacts
- ◆ Présenter le congrès et l'Espéranto à des sponsors et les convaincre

**Accueil**

- ◆ 60 volontaires pour accueillir les congressistes le premier jour et aider quelques heures pendant le congrès.
- ◆ Volontaires pour aider sur le matériel dans le lieu de congrès

**Komunikado**

- ◆ Volontuloj por (re)ali kun restoracioj, hoteloj kaj butikoj, kaj proponi tradukojn en Esperanto de menuoj aŭ akceptaj dokumentoj (en Ĥurto)
- ◆ Volontuloj por helpi al kongresantoj de la franca lingvo komenti kaj trovi de siaj parolantoj
- ◆ Volontuloj por informi en la Ĥurto

**Excursions**

- ◆ Interprètes pour traduire les guides français
- ◆ Guides pour mener un groupe à travers des lieux touristiques et en faire la présentation
- ◆ Accompagnateurs pour aider le guide sur les problèmes techniques (contrôler les présences, s'occuper du bus...)

**Communication**

- ◆ Volontaires pour assister les restaurants, hôtels et commerces et leur proposer une traduction de leurs menus ou faire d'accueil en espéranto
- ◆ Volontaires pour aider à la composition du comité d'honneur et trouver un président d'honneur
- ◆ Volontaires pour informer en ville

**Ekskursoj**

- ◆ Bultradukantoj por traduki la francajn gvidantojn
- ◆ Gvidantoj por gvidi grupon tra turismaj lokoj kaj klarigi ilin
- ◆ Akompanantoj por helpi la gvidantojn pri praktikaj (kontroloj, restantojn, zorgi pri la buso...)

**Excursions**

- ◆ Interprètes pour traduire les guides français
- ◆ Guides pour mener un groupe à travers des lieux touristiques et en faire la présentation
- ◆ Accompagnateurs pour aider le guide sur les problèmes techniques (contrôler les présences, s'occuper du bus...)

Kontaktu nin ĉe [lille2015@lille2015.fr](mailto:lille2015@lille2015.fr) aŭ alvokante Julia ĉe +33 6 17 06 80 70  
Contactez-nous sur [lille2015@lille2015.fr](mailto:lille2015@lille2015.fr) ou en appelant Julia au 06 17 06 80 70